

EKO 2023

Pensu globe, Agu loke! Por la Landa kaj Faka Laboro



Nia aganto pri instruado kaj progreso

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komuniko



EKO 2023 / 73. Decembro 30, 2023

Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Elda Doerfler, Frank Lappe.

Pezo: Word nur teksto: 40 KB; Ĝia sveltigita PDF: 340 KB. Alkroĉaĵo per-kun: 10 KB. Sume: KB 390.

Nova informa rekordo en Hungario

Pro la Z-tago en Hungario ni aperigis mesaĝon en *Facebook*, artikolon de *National Geographic* pri Esperanto. La afiŝon ni subtenis per pagita reklam-kampanjo, kies rezultaj nombroj **superas ĉiujn ĝisnunajn datumojn**, ligitajn al hungarlingvaj priesperantaj mesaĝoj.

- La afiŝo estis montrita al 14.238 personoj, inter kiuj 1.823 personoj eĉ klakis sur ĝin, do ili legis la artikolon, aŭ almenaŭ komencis tion.
- 106 homoj kundividis la afiŝon en sia fejsbuka muro, kiu plu kreskigis la kvanton de legantoj.
- **La mesaĝo ricevis 1.109 ŝatojn!** Mi ne scias pri iu alia Esperanta mesaĝo kun hungara rilato, kies ŝatoj eĉ proksimus al tiu ĉi nombro.
- Alparolis 85 personoj, tio montras aktiviĝon de eksteraj legantoj.

Tiuj datumoj laŭ mia scio multe superas la datumojn de similaj Esperantaj afiŝoj ĉe la hungara publiko. Por reale pritaksi ĝin, oni konsideru ke la loĝantaro de Hungario estas nur 9,5 milionoj da homoj! Por la kampanjo nia Eo-fondaĵo elspezis entute nur €130. Mi scias, ke la efiko de FB-kampanjoj estas rekte proporcia al la investita sumo, sed nia buĝeto estas limigita. La nuna kampanjo rezultigis la sekvajn enspezojn: 11 cendoj por ĉiu ŝato, 7 por ĉiu klako, kaj 153 cendoj por ĉiu alparolo.

Szilvási László, Lingvo-Studio, www.eventoj.hu

Vacape, France, Konge

La franca instruistino Françoise Noireaux gvidas gigantan kurson pri Esperanto per vacapo en la franca kadre de la Fakultato pri Lingvoj de la Universitato Espoir en Baraka, DR Kongo. Ŝi estas en kontakto kun 230 afrikanoj, ĉefe el Kongo DR. Kiel okazas ĝenerale en vacapaj kursoj, tio ne signifas, ke ĉiuj diligente lernas, sed ke ĉiuj ricevas materialojn kaj lecionojn kaj progresas laŭ individua ritmo. La plej progresintaj estos ekzamenitaj rete de la komisiono de ILEI ĉiun sesan monaton. Pro la multeco de la lernantoj ŝi utiligas la helpon de afrikaj instruistoj, Espoir, Gadoufia, Serĝo, Victor.

En Rusio oni daŭre prizorgas Lingvajn Festivalojn

Dum la 17-a Moskva Lingva Festivalo, kiu okazis la 10-an de decembro 2023 en la Supera Lernejo pri Ekonomio kun pli ol 1700 gastoj, estis prezentitaj 65 lingvoj, 30 lingvistikaj prelegoj, 20 atelieroj kaj 15 lecionoj por infanoj. Legu prian artikolon de Irina Gonĉarova en la novaĵretejo “La Ondo de Esperanto”

<https://sezonoj.ru/2023/12/ruslando-53/>

Instruistoj celataj en Kenjo

Nia tritaga seminario komenciĝis la 14-an de decembro 2023. La temo estas trejnado de novaj instruistoj, entute 15 homoj partoprenis ĝin. Nia ĉefa celo estas disvastigi Esperanton en Kenjo, kaj la grupo ĉefe celita estas infanoj, junaj kaj maturaj homoj. Klubo estas starigitaj en regionoj kaj vilaĝoj, por ke Esperanto atingu multajn personojn. Jam estas kluboj en Najrobo, Mombasa, Bungoma, lodwar, Eldoret kaj Kapsabet. Sed al ni mankas lernomaterialoj kaj legolibroj. Ni diskutis kiel instrui legadon, paroladon kaj skribadon. Krome, ni diskutis kiel antaŭenigi la ILEI-sekcion en Kenjo.

Gilbert Simiyu Sikala, ILEI-sekciestro.

La renoma Londona klubo ankoraŭ aktivas

En januaro la Londona Esperanto-Klubo (LEK) lanĉos **novajn retajn Esperanto-kursojn** por komencantoj (A1) ĝis progresintoj (C1). Vi trovos la liston ĉi tie:

<https://londonaesperantoklubo.com/online-esperanto-courses.html>

La informoj en la retejo estas en la angla, sed la kursoj mem estos en Esperanto, krom tiuj por komencantoj. Se vi konas iujn, kiuj interesiĝas pri Esperanto kaj ŝatus lerni ĝin, bonvolu sciigi ilin pri ĉi novaj kursoj por komencantoj. Tiuj estas principe senpagaj, sed por iuj ni petas libervolan malgrandan kontribuon por helpi nin kovri niajn kostojn. Se vi havas demandojn aŭ bezonas klarigojn, ne hezitu kontakti min.

Anthony Rawlinson

<[edukado.net](https://www.edukado.net)> informas ke aldoniĝis ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Kurso por tut-komencantoj (Kurso I)
Gvidantonomo: Vince Allison; Aldoninto: Anthony Loko: Londono, Britio.

Vi trovos ĝin en la paĝo:

<https://edukado.net/kursejo?kid=27606>



La Akademio elpaŝis

La 14-an kaj 15-an de decembro 2023 la Akademio de Esperanto okazigis retan konferencon, konsistantan el naŭ prelegoj. Legu prian raporton de la sekretario de la Akademio François Lo Jacomo en la novaĵretejo “La Ondo de Esperanto”

<https://sezonoj.ru/2023/12/akademio-23/>

Facila aliro al la postdiplomaj studoj en Poznano

Jen raporto kun foto en gradigita Esperanto:

<https://uea.facila.org/artikoloj/%C4%9Denerale/post-diplomaj-studoj-pri-inter-lingvistiko-pinto-kaj-fino-r404/>

Litova Kongreso jarfine

La 16-an kaj 17-an de decembro 2023 en Kaŭno okazis la 58-a Kongreso de Litova Esperanto-Asocio kaj la tradiciaj Zamenhof-Tagoj 2023 kun 80 partoprenantoj.

Legu ampleksan ilustritan artikolon de Povilas Jegorovas en “La Ondo de Esperanto” ĉe

<https://sezonoj.ru/2023/12/litovio-69/>



Kiujn servojn bezonas instruistoj?

Jen temo por la Laborgrupo pri Esperanto en Lernejoj. Eblas agadi laŭ pluraj manieroj, ekzemple: varbi lernejarajn instruistojn al Esperanto kaj helpi lernejarajn instruistojn agadi.

Pripensu pri la bezonoj de lernejaraj instruistoj: ĉu *Juna Amiko* sufiĉas? Kiaj servoj de ILEI helpus ilin? Krom kelkaj esceptaj instruistoj kiuj ĝuas favoran situacion, ilia plimulto instruas en grandaj publikaj lernejoj kie Esperanto ne estas lernobjekto. Instruistoj devas multe klopodi por povi iomete agadi por akceptigi Esperanton en la lerneja sistemo, por informi kaj trovi interesigantajn lernejaranojn. Tiuj instruistoj bezonas helpon, servojn por kuraĝigi la lernantojn, organizi agadojn, eĉ kursojn, ĉar ili ne havas tempon por nedeviga fako. Kun sukcesa varbado de novaj instruistoj al Esperanto, tiuj bezonoj kreskos.

El unuaj interŝanĝoj kaj retaj kunvenoj, venis ideoj pri solvoj por helpi instruistojn. Ekzemple: organizi jaran konkurson por lernejaranoj por kuraĝigi ilin lerni Esperanton dum la jaro, interalie eksterlernejaj lecionoj per retaj kursoj. Pliaj ideoj:

- organizi retajn aŭ fizikajn renkontiĝojn inter lernejaranoj kiuj studas Esperanton
- ĝemeligi klasojn per Esperanto,
- proponi materialon al instruistoj (interalie por tiuj al kiuj mankas tempo aŭ sperto) por organizi kursojn aŭ agadojn.

Ĉu vi havas aliajn ideojn, havas demandojn aŭ aldonojn al la supraj proponoj? Ĉiuj ideoj estas bonvenaj! Prezentu ilin dum venonta reta kunveno okazonta fine de januaro 2024. <https://www.ilei.info/novajxoj/laborgrupo-E-en-lernejoj.php>

Koncizigo de mesaĝo de Didier Janot

Ŝanĝoj en Kongo DR

La Komitato de Demokratia Kongolanda Esperanto-Asocio (DKEA) organizis viziton al s-ro Lungikisa Sumbu Jean-Pierre, eksprezidanto de tiu ĉi asocio kaj reprezentanto de Universala Esperanto-Asocio ĉe Unesko. Estas la iniciato de la nuna prezidanto de DKEA, s-ro Guy Roger Iлека, kiu planas viziti siajn antaŭulojn sen forgesi la pioniron de la lingvo, s-ro Alphonse Ngangu Ndotoni nun loĝanta en Angolo. La prezidanto de DKEA profitis tiun ĉi eblon por okazigi kunsidon el kiu nur unu punkto estis enskribita en la tagordo, nome la anstataŭigo de S-ro Joël Muhire ĝisnuna kasisto de DKEA; per la elektita s-ino Fidélie Kanjinga.

Koncizigo de raporto de Guy Roger Iлека, prezidanto de DKEA

Sezona imperiismo

Niaj lerniloj sklave ripetas la kvar sezonojn: vintro, printempo, somero kaj aŭtuno. Sed tiu skemo tute ne estas universala. Tanzanio havas du sezonojn: la seka sezono kaj la neseka sezono. Landoj apud la akvatoro – ekzemple Singapuro, partoj de Brazilo, kaj Indonezio. Legu pri sezonoj en tiulasta lando en facila Esperanto:

<https://uea.facila.org/artikoloj/lega%C4%B5oj/la-sezonoj-la%C5%AD-indonezia-vidpunkto-r405/>

Sezonaj salutoj de SMG

Laŭdo al EKO el Nederlando

EKO kutime malkuraĝigas min blovi la propran trumpeton, sed mi ne povas rezisti citi la jenan respondon al mia Z-taga saluto al la Landaj Asocioj.

“Ankaŭ al vi ni deziras ĉion bonan por la nova jaro 2024!
Ĉiam estas interese legi viajn informleterojn!”

Ineke Emmelkamp, Sekretario de Esperanto Nederland

ABBA helpas al ni festi la Silvestron

Por festi la jarŝanĝon, ni escepte allasas la festan kanton ‘Happy New Year’ de la mirinda sveda kvaropo. Ili ja kantas en la angla, kiu ne estas ilia unua lingvo. Sed ili uzas la anglan tiom simple, kaj tamen kun granda lerto, kun la kapablo komuniki belajn ideojn. La registro okazus antaŭ 14 jaroj kaj daŭras kvar minutojn kaj duono.

<https://www.youtube.com/watch?v=3Uo0JAUWijM>

===== vortoj: 1200 =====



La kolekto de EKO por 2023: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php> (ĝis 70).

La Komunikilo iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1600 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikilo estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuita Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.

Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill@uea.org>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolisto.



EKO deziras al la legantoj prosperan kaj produktivan novan jaron, kiam ajn vi festas la eventon!